ĜENERALA INFORMILO

N-ro 142 marto 2007

BARCELONA ESPERANTO-CENTRO
Bassegoda, 40, 3º, 1ª
ES-08028 BARCELONA, Hispanio, Eŭropa Unio
Telefono 93 333 80 81, barcelonaesperantocentro@yahoo.es

A T O M O
Junulara Sekcio de BE-C




**15a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO**
**TOSSA DE MAR, HISPANIO, EŬROPA UNIO, 29 SEPTEMBRO 6 OKTOBRO**
**" Sub aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo"**

Koresponda adreso: Luis Serrano Pérez. Apartat 423. ES-08200 Sabadell, Hispanio
Tel, ( +.34) 93 727 50 21. <luis_serrano@mixmail.com> http://personales.ya.com/semajno

**4a PREMIO ADA SIKORSKA FIGHIERA. Kandidatigoj.** La proponoj por la Premio devas esti alsenditaj de loka, nacia aŭ internacia E-Grupo,Klubo, Organizo , Socio aŭ esperantisto antaŭ la 15an de aŭgusto 2007, al la prezidanto de la Premia Komisiono: G.C. Fighiera, Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale (Torino) Italio,. Fax (Italio 2263078) , giancarlo.fighiera@libero.it Dankon por via kunlaborado.

**PRELEGOJ**. Ni jam povas konfirmi vin, ke Prelegos: Pere Navarro-Rosines prof. pri botaniko (Universitato de Barcelono) pri la temo: **"La evoluo de la homo. Vojaĝo tra la tempo de niaj praulоj"**. kaj Ives Eeckhout el Belgio pri: **"Birdoj: kial, kiel, kie kaj kiam observi kaj rekoni ilin?"**. Ni atendas konfirmojn de novaj prelegantoj.

**Kiel kutime** Salvador Aragaj gvidos la superan kurson kun novaj lecionoj kaj ludoj. **O.K.**



**firentitats ' 0 7**

**"El teu espai, la teva gent"**

**del 4 al 6 de maig**

**Parc de l'Espanya Industrial.Horari:Divendres 4 de maig: de 17 a 21 h.Dissabte 5 de maig de 10 a 21 h.Diumenge 6 de maig 10 a l4 h. Fes-te al carrer.Trobada de cultura popular.**

**Fes-te'n soci ara. Necessitem persones com tu. Persones que garanteixin la responsabilitat social i el respecte dels drets humans. Barcelona Esperanto-Centro, Ajuntament de Barcelona, Secretariat d'Entitats Sants, Hostafrancs i la Bordeta.**

## KIA LINGVO ESTAS ESPERANTO?

Tralegante E-revuojn kaj aliajn eldonaĵojn, ni povas konstati ke por kvalifiki nian lingvon Esperanto, oni uzas diversajn adjektivojn apud la vorto lingvo. Ekzemple: neŭtrala lingvo, helpa lingvo, racia lingvo, nenacia lingvo, paca lingvo, dua lingvo, universala lingvo. internacia lingvo, ponto-lingvo ktp.ktp.

Tiom da adjektivoj por la lingvo Esperanto certe povas okazigi al la negeesperantistoj kaj eĉ al la geesperantistoj, konfuzojn kaj dubojn pri la celo de Esperanto laŭ d-ro Zamenhof . Pro tio mi deziras insisti ke ni povas paroli en Esperanto pri ĉio, por ĉiuj temoj kaj kun ĉiuj personoj kiel indikas la deklaracio de "Bulonjo ĉe Maro", okaze de la Unua Esperanto-Kongreso en Francio la jaron 1905,

Verdire, laŭ la penso de Zamenhof, li indikis jam en sia Unua Libro, ke ni devas uzi Esperanton kiel **Internacian Lingvon, kiel komprenilon intergeparolantoj de aliaj diversaj lingvoj**. Plie en liaj verkoj li valoras tre pozitive ke **Esperanto estas kaj estos livera lingvo de ĉiu religia, politika aŭ imperialista kateno**. Tiuj punktoj estas tre gravaj por la E-Organizaĵoj, ĉar la naciaj kaj ŝtataj lingvoj malgraŭ ke kelkaj el ili estas uzataj kiel internaciaj, neniam ili povas kaj povos plenuni plene la taskon de internacia lingvo, ĉar volonte aŭ nevolonte iliaj geuzantoj agas hegemonie kaj kontraŭas ĉiujn principojn de lingvaj egaleco, objektiveco kaj demokrateco, kiam oni devigas kaj altrudas la uzadon de sia lingvo en internaciaj kongresoj kaj konferencoj al aliaj nacioj kaj personoj,

Tiel do mi sugestas kaj rekomendas al vi uzi nur la adjektivon INTERNACIA . Ekzemple : INTERNACIA LINGVO. Aŭ INTERNACIA ESPERANTO-LINGVO. Tiamaniere ni tre bone distingos nian internacian lingvon rilate la aliajn naciajn kaj ŝtatajn lingvojn, kiuj estas nun uzataj internacie.

Salvador Aragaj

---

BARCELONO

De la 8a ĝis la 21a de februaro estis prezentita la eskpozicio " Esperanto en la antikva Barcelono, kompilado de bildkartoj,insignoj kaj afiŝoj" en la Civitana Centro Guinardo, fare de Ferran Ripoll. Kunlaboris BEC kaj KEFA.

Faris la inaŭgursaluton Ferran Ripoll je la 19,30 h. Menciendas la bilkartoj, afiŝo kaj kongreslibro de la 5a Universala Kongreso de Esperanto la jaron 1909 en Barcelono kaj abunda bildkolekto pri la mirindaj konstruaĵoj de la modernismaj arkitektoj kiel : Antonio Gaudi, Lluis Domenec, J.Ma Jujol, J.Puig i Cadafalch, ktp. de Ferran Ripoll.

En apuda salono estas la afiŝkolekto de la UK-j de Esperanto, evidente la unua estis la afiŝo de la 5a UK en Barcelono la jaron 1909 kaj la lasta la 92a UK de Esperanto en Jokohamo, Japanio kaj alia kolekto pri la Hispanaj Kongresoj de Esperanto de la jaro 1936 okazita en Barcelono ĝis nun. La afiŝoj estas de la arkivo de BEC,

En apuda loko estis afiŝoj pri la instruado de Esperanto, Internaciaj kongresoj IES kaj de IFEF.

Je la 20.00 h. la elstara preleganto kaj estrarano de KEFA Martí Guerrero parolis antaŭ 40 personoj dum 30 minutoj pri la temo. " L' anglès i l' Esperanto". Jen liaj ĉefaj ideoj: "*La aktuala situacio de la angla lingvo estas orgojla kaj superrega ene de la internaciaj kunvenoj..... Malgraŭ la avantaĝon, ĝi ne estas valida por ni kiel internacia lingvo ĉar, estas tre malfacila pro ĝiaj abundaj esceptoj..... Kontraŭe la logika planlingvo Esperanto kreita de Zamenhof, kun 16 bazaj reguloj, sen esceptoj, vortaro internacia, alfabeto de la plej gravaj eŭropaj lingvoj, lernigita en pli da 30 universitatoj el 20 landoj, estas la unika solvo por detrui la lingvajn problemojn de nia civilizacio*". Tondra kaj longa aplaŭdo sigelis la oratoron.

Poste Antonio de Diego prezidanto de KEFA, informis nin pri la lingva problemo por la lokomotivestroj kiuj trapasas Eŭropon. Pro tio li en sia kunveno kun la fervojistaj aŭtoritatuloj de Madrido proponis Esperanton. La publiko dankis lin por lia propono.

Sekve en la salono de la ekspozicio la organizantoj invitis al la publiko gustumi aperitivon kun ĉampano.

**Suno**

## InPaSem 2006

Okazis de la 2-a ĝis la 8-a de oktobro en Ĉeĥio, proksime al Prago, en urbo Dobřichovice. Organizis ĝin, jam la 5-an fojon, Petr Chrdle. Li loĝas en tiu urbo, situanta je 25 km sudokcidente de Prago. La urbo Dobřichovice havas ĉirkaŭ 3 000 loĝantojn. Ĝi kuŝas ĉe rivero Berounka. Apud la rivero ni povas admiri kastelon, statuon de Johano el Nepomuk kaj tilion plantitan en la jaro 1729. La urbo famas pro riĉaj vilaoj de milionuloj en kiuj instaliĝis praganoj. Ĝi estas ilia ŝatata ripozloko.

InPaSem (Internacia Paroliga Semajno) - temas pri paroligaj kursoj kaj pri kurso por komencantoj. Post la lernado ni ĉiutage kantis kun akompano de gitaro. Krom 5 ĉeĥaj partoprenantinoj venis grupo da 22 interesuloj el Francio sub gvido de Jean Ripoche. Sabate alvenis pluaj ĉeĥaj samideanoj por sperti agrablan etoson semajnfine.

La antaŭtagmezoj estis dediĉitaj al la instruado kaj praktikado de Esperanto. La komencantojn instruis Stano Marĉek el Slovakio laŭ sia propra metodo. Ĝi montriĝis tre interesa kaj intensa. Post unu semajno la lernantoj havis bazajn konojn pri gramatiko kaj povis interparoli kun aliaj, eĉ kun pli spertaj esperantistoj. La progresantojn paroligis Petro Chrdle kaj la kurso okazis en lia loĝejo. La plej spertajn kaj tiujn kiuj intencis trapasi elementan ekzamenon gvidis s-ro Albrecht Kronenberger, konata pastro el Germanio.

Dum la posttagmezoj estis programitaj diversaj vizitoj al Prago. Trifoje oni admiris la belecon de la ĉeĥa ĉefurbo. La unuan posttagmezon ni vizitis la rigardejon "Petřín", kiun la francoj komparis al la pariza Eifelturo. Surloke troviĝas ankaŭ spegula labirinto. Tre impresa kaj alloga estis vizito al la praga kastelo "Hradčany" kaj al la konata "Ora strateto". Venceslao-placo, la granda kaj longa avenuo kiun dominas la statuo de Sankta Venceslao sur ĉevalo tre plaĉis al la vizitantoj. Tre bela estas la Malnova urbo, kie ĉiuj admiras sonoran mekanikan horloĝon kun 12 apostoloj montriĝantaj ĉiuhore en malgrandaj fenestroj. Laste ni vizitis la tombejon kaj ĉirkaŭaĵon de "Vyšehrad". Ĉiuj vizitoj estis tre interesaj kaj kun la loka juna ĉiĉerono, Dan Mrázek, bone prezentitaj. Niaj francaj geamikoj estis ravitaj kaj aŭdiĝis voĉoj, ke Prago estas eĉ pli bela ol Parizo. Unu vesperon ni spektis en Prago en "Nigra teatro" la fabelan prezenton "Alenka v říši divů" (Alenjo en mirakla lando). Ĝi estis vere magia kaj ravis ĉiujn ĉeestantojn. La francoj neniam vidis ion similan. Ili aprezis tiun-ĉi spektaklon. Post interesaj vizitoj oni kutime bone vespermanĝis en tipaj restoracioj de Prago kaj trinkis bongustan pilsenan bieron. Merkrede okazis vizito al ne tro malproksima burgo "Karlštejn". Ĝi estis fondita de Karlo la 4-a en la 14-a jarcento. Ni admiris ĝin jam de malproksime kaj poste en ĝia korto. Surloke, en la vilaĝo, ni vizitis muzeon de kripoj faritaj el diversaj materialoj. La plej malgranda eniris nuksoŝelon, aliaj estis faritaj el marcipano, papero, vitro aŭ ligno. Sekvis vizito de iama monaĥejo en Sankta Johano sub Roko. Laŭ la legendo tie vivis en kaverno en la 9-a jarcento ermito Sankta Ivano. En malgranda preĝejo ni povis vidi spurojn de tiu sanktulo. La plej kuraĝaj inter ni piediris ĝis la supro de la roko de kie estis bela vidaĵo al vasta ĉirkaŭaĵo. La vizito finiĝis en restoracio ĉe bongusta vespermanĝo. Revene ni kantis en la buso.

Dum la aranĝo eblis aliĝi al la ILEI - ekzamenoj. Tion profitis tri gejunuloj el Ĉeĥio kaj tri francoj. Ĉiu partoprenanto de InPaSem ricevis diplomon pro partopreno en la kurso de Esperanto. Unu posttagmezo estis dediĉita al libervola prezentado de amuzaĵoj fare de la ĉeestantoj. Aŭdiĝis poemoj, skeĉoj kaj kantoj. Ni bone ĝuis la semajnon kaj agrable interbabilis. La aranĝo plaĉis al ĉiuj kaj multaj promesis reveni venontjare.

Liba GABALDA

5 – 8 DE JULIO 66a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ 12a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO EN PALOS DE LA FRONTERA (ONUBO), HISPANIO. Informojn: angelarquillos@gmail.com

**¿Te gustaría que con una sola lengua todos los pueblos de la tierra pudiéramos entendernos?**

# APRENDE ESPERANTO

**La lengua internacional reconocida por la UNESCO**

## 10 MOTIVOS PARA APRENDER ESPERANTO

**1 – ELIMINA BARRERAS LINGÜÍSTICAS**
Estás en plan de igualdad con gente de otros países
**2 – ES NEUTRAL** Ninguna lengua es superior a otra
**3 – FACILITA LOS VIAJES AL EXTRANGERO**
Hay esperantistas en 120 países
**4 - ES SENCILLO** Sólo tiene 16 reglas sin excepciones
**5 – ES LÓGICO** Tiene una gramática regular
**6 – FOMENTA EL SENTIMIENTO INTERNACIONALISTA**
**7 – PERMITE LA COMUNICACIÓN DIRECTA CON PERSONAS DE TODO EL MUNDO**
**8 – NO PRECISA APRENDER IDIOMAS.** Con el propio y uno más, basta.
**9 – ECONOMIZA GASTOS DE TRADUCCIONES Y INTÉRPRETES.**
**10 – SU UILIDAD ES COMO LA DEL TELÉFONO Y DEL INTERNET.**
Depende de la cantidad de personas que la utilicen.

Nació del sentimiento de un hombre que defendía la igualdad de derechos de todos humanos, independientemente de razas, étnias, religión, lengua, etc.

**Enseñanza gratuita**
KATALUNA ESPERANTO FERVOJISTA ASOCIO
Josep Tarradellas, 192, Estación RENFE L'Hospitalet
Todos los miércoles, de 19 a 20 horas

Tel. 93 337 50 46

Inscripciones los lunes de 18 a 20 horas

---

## 6-AJ SOMERAJ DIALOGOJ
**ESPERANTO-RESTADEJO 8-9 SEPTEMBRO**

En Monistrol de Montserrat, Barcelono. Sidejo kaj koresponda adreso: BE-C Salvador Aragaj Cami del Pou n-ro 9, ES-08691, Monistrol de Montserrat, Hispanio, Eŭropa Unio. Tel 64 54 04 755. Informojn: Retadreso: barcelonaesperantocentro@yahoo.es
Programo: tagon 8an je la 11a horo Saluto kaj bonveno. Prelego kaj Dialogoj. Esperanto-leciono. Babilado. Ronda diskutado. Nur tagmanĝo 14 €. Matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo kaj loĝejo, kompleta pensiono en dulita ĉambro 35 € po persono kaj tago. Kompleta pensiono en unulita ĉambro 45 € (unu persono) po tago,en "Hostal Guilleumes" apud la Restadejo. La prezoj inkludas la aliĝon.

---

## ESPERANTA STAĜO AGDE (FRANCIO) DE LA 16a ĜIS LA 23a DE MAJO
**Temanta pri la ĉirkaŭumo**

Sendu la aliĝilojn al : Cercle Biterrois d'Esperanto, Herbette-Rizo Chistian, 22ZA Le Bousquet, 34310 Montady, Francio. AGADPROPONOJ. Kursoj de la 9a ĝis 12a kaj de la 16a 30 ĝis 18a 30. 1a nivelo: Georges Gonthier. 2a nivelo konversacio: Judith Horvart (Hungarino). 3a nivelo: Jean-Pierre Boulet